



Rikolto Abunda kun Signifo Profunda

— Parolo en la Kunsido Honore al la 88-jariĝa Jubileo de Lisen

Guozhu (2010-06-25)

此中有深意 米寿正堪言

— 在祝贺李森同志米寿座谈会上的发言

国柱 (2010-06-25)

Honore al la 88-jariĝa (aŭ ĉin-stile nomita riz-aĝa) jubileo de la estimata veterano Lisen, ĉinaj esp-istoj okazigas specialan kunsidon. Mi sentas grandan ĝojon ke mi havas la feliĉon ĉeesti kaj paroli ĉitie en la memorinda kunsido. 今年是李森同志的米寿之年，中国世界语者们为之举办座谈会，国柱有幸出席，感到非常高兴。

Ĉinoj havas la tradicion respekti maljunulojn. Ke maljunuloj ĝuas socian respekton, tio okazas ne nur konsekvence pro ilia granda aĝo. Fakte aĝo estas nur unu el la motivoj, sed certe ne la unika aŭ plej grava motivo. 中国人素来有敬老的传统。老人之可敬，年龄只是原因之一，但不是唯一、更非最重要的原因。

La pli grava motivo estas la bonfama prestiĝo de la jubileulo kiu konkeris ĉies

respekton per sia bonvirteco. 更重要的原因，是老人的德高望重，使大家心折。

La bonfama prestiĝo devenas de la bonvirteco. Bonvirteco reliefigas dank' al lia kontribuo. Kontribuon donas lia laboro. 望重缘于德高，德高缘于贡献，贡献缘于工作。Ĝuste per sia eminenta laboro s-ano Lisen fariĝis la unua laŭreato de la Premio Speciala Kontribuo en la historio de la ĉina Esperanto-movado. 李森同志正是由于自己杰出的工作，为中国世运作出了特殊的贡献，成为中国世运史上荣获特别贡献奖的第一人。[1]

Pro kia laboro s-ano Lisen akiris la gloron kiel la unua laŭreato de la Premio Speciala Kontribuo al la ĉina Esperanto-movado? Kion laŭdindan li faris? Lia riz-aĝa (88-jariĝa) jubileo proponas al ni la bonan ŝancon paroli admire pri tio en intima kunsido. 李森同志是荣获中国世运特别贡献奖的第一人。他做了哪些工作，令人称道呢？他的米寿正好给了我们这样一个座谈的机会。

Ni devas diri, ke la kontribuo far Lisen por nia ĉina EM estas granda kaj la tereno de lia agado estas tre vasta tiel en laboroj Por kiel ankaŭ en laboroj Per. Li plen-energie sin donis en aktivadoj propagandi, disvastigi, eduki, apliki Esperanton. Nun mi volas paroli ĉefe pri lia aktivado en eldonado de Esperantaj libroj, precipe paperaj. 应当说，李森同志为中国世运所做的贡献巨大而且活动领域宽广。无论是 Por 还是 Per，举凡宣传、推广、教育、运用，他都全身心地投入，着力甚多。国柱现在只打算着重介绍一下他的世界语出版活动。

Estas famkonata, ke eldonado estas nemankigebla por disvastigo de Esperanto. La historio de Esperanto komenciĝis ja ekde la publikigo de la Unua Libro (1887). Esperanto-eldonado daŭris ĉiam per stafeto en malfavora cirkonstanco, spite al ambaŭflankaj subpremo kaj malhelpo de politiko kaj ekonomio. 众所周知，世界语要想推广，离不开出版。世界语的历史就是从《第一书》(1887)的出版开始的。世界语的出版，一直是在逆境中接力奋斗，克服来自政治和经济方面的双重压力和阻力。

Verŝajne la cirkonstanco por eldonado de Esperantaĵoj en Ĉinio estas la plej favora, ĉar ne mankas homo, mono kaj nomo. La Esperanta versio de la t.n. ruĝa trezora libreto <Vortoj de Mao Zedong> eldoniĝis unufoje jam en 75 miloj da ekzempleroj. Tiel ekstrema rekordo certe estas neatingebla en aliaj landoj. (Siatempe en la Granda Kultura Revolucio, la olepenetraĵo <Prezidanto Mao iras al Anyuan> presiĝis eĉ je 9 cent milionoj da folioj, tiu nombro ja superis tiom de la tuta loĝantaro de Ĉinio, kreante ankoraŭ pli ekstravagance mondrekordon senprecedencan kaj sensekvantan). Guozhu nomas tion disipa luksaĵo de favora cirkonstanco. 中国的世界语出版活动，似乎是全世界条件最好的：有人、有钱、有名义。世界语版红宝书《毛语录》一次就印刷了 7.5 万册。这样的纪录，令其他国家的同行，望尘莫及。（当时油画《毛去安源》印了九亿张，超过全国人口数，更是空前绝后的世界级出版纪录。）国柱把这种处境称之为顺境的奢华。

Ĉiu medalo havas du flankojn. Estas vera fakto, ke la libro <Vortoj de Mao Zedong> eldoniĝis unufoje en 75 miloj da ekzempleroj. Samtempe, ankaŭ estas vera fakto, ke la Esperanta eldonado de la kvina volumo de <Elektitaj Verkoj de Mao Zedong> estas nuligita post la pretigo de la tradukaj manuskriptoj. Estas vera fakto, ke la aŭtoritatoj havas kaj homon kaj monon kaj nomon; samtempe, ankaŭ estas fakto ke mankas al popolanoj kaj homo kaj mono kaj nomo por eldoni Esp-aĵojn. Do en

Ĉinio la favora kaj malfavora cirkonstancoj por eldoni Esp-aĵojn en Ĉinio fariĝis vere imageblaj por neĉinaj esp-istoj tra la mondo. Mi donu kelkajn ekzemplojn sube:

一个徽章有两面。《毛语录》一次印刷了 7.5 万册是事实。而世界语版《毛选五卷》翻译定稿完成之后被取消出版，也是事实。官方的“三有”是事实，民间的“三无”（无专职人员、无出版经费、无出版社）也是事实。由此而引申出来的出版条件之好之坏，均为国外世界语同志难以想象。试言数例：

* Ĉinaj esp-istoj pretigis la esp-igon kaj kompiladon de la unua poemaro de Li Bai, sed post jaroj da penado neniel sukcesis trovi eldonan eblecon en Ĉinio. Tiu libro fine estis eldonata de <Riveroj> 1997 en Japanio. Ĉinaj esp-istoj sen valuto nek povas aĉeti nek povas legi tiun poemaron bonvenigatan internacie.

* 中国的世界语者完成了第一本《李白诗选》的世译和编辑，经过几年的努力，却始终无法在中国出版。最后于 1997 年花落日本，由日本河川社出版。中国世界语读者若没有外汇就买不到也读不到这本受到好评的书。

* Per klopodado dum sia tuta vivo s-ro Wang Chongfang kompilis <Grandan Ĉina-Esperantan Vortaron> kun senprecedenca amplekso de 5 milionoj da vortoj, sed neniam akiris subtenon de la aŭtoritatoj. La vortaro fine estis eldonata dank' al monhelpo de plebaj ĉinaj esp-istoj. Kiam okazis la inaŭgura soleno por tiu vortaro, la arogantaj estroj de nuna ĈEL rifuzis ĉeesti, kvankam ili troviĝas ĉeloke en la sama etaĝdomo.

* 王崇芳老师以毕生的精力，编成了 500 万字规模空前的《汉世大词典》，始终无法得到官方的支持，最后于 2007 年由民间出版。在羊城会议举行首发时，CEL 现任的领导(李于)等人，人在现场却拒绝参加。

* La libro <Laŭzi>, esp-igita de s-ro Wang Chongfang, ne estas tiom ampleksa en 5 milionoj da vortoj. La originalo de <Laŭzi> konsistiĝas nur el 5 mil ideogramoj. Tamen ĝi ne povas eldoniĝi en Ĉinio. Koreaj esp-istoj plurfoje proponas ke ili tre volantas eldoni tiun libron en Koreio, tamen s-ro Wang Chongfang danke rifuzis la proponon.

* 王崇芳老师世译的《老子》一书，没有 500 万字，原文只 5 千言，在中国还是无法出版，韩国人几次愿意拿去在韩国出版，被王崇芳老师婉言谢绝。[2]

* Mia amiko Shi Chengtai ĉinigis el Esperanto la faman libron <7000 Tagoj en Siberio>. Ĝi ankaŭ renkontis la same malfavoran sorton kiel la supremenciitaj libroj. Poste ĝi finfine aperis en kongresejo de la 89-a UK en Pekino kaj ĝuis varman bonvenigon de diverslandaj legantoj. Fakte ĝi sukcesis aperi nur dank' al la malavara monhelpo de Kurisu Kei kaj japanaj s-anoj.

* 石成泰从世界语汉译的《西伯利亚七千天》，在 2004 年北京 UK 期间，受到各国读者的重视和欢迎，是靠日本栗栖继老人的毕生积蓄和日本世界语者的集体赞助才得以出版。

* <Kantoj de Anteo>, poemaro de ĉina Esperanta poeto Mao Zifu, neniel povis aperi en Ĉinio. Poste ĝi estis eldonata de usona eldonejo Mondial 2006 en Novjorko.

* 毛自赋的世界语诗集《安泰之歌》，无法在中国出版，后来由美国 Mondial 社 2006 在纽约出版。

* Veterana esp-isto Li Naixi, kiu meritas la titolon la Patro de la Ĉina Esperanto-Eldonejo (Pekino), en sia 90-a jaraĝo volas eldoni mempage la ĉinigon de la longa poemo <Brava Johano> de Petofi, sed li renkontis nur ĉikanon kaj rifuzon.

* 李奈西老人，堪称是中国世界语出版社之父，他在九十多岁高龄的时候，想自费出版他汉译的裴多菲名诗《勇敢的约翰》一书，竟然遭到刁难和拒绝。

* La fama Esperanta revuo <El Popola Ĉinio> fondita en 1950 ĝuis vastan bonvenigon de legantoj tra la mondo. Post eldono de 500 numeroj en 50 jaroj, malaperis laŭ ordono de la aŭtoritatoj en la komenco de la nova jarmilo.....

* 从 1950 年创刊的世界语杂志《中国报道》，深受国内外读者广泛欢迎，在坚持出刊 50 年、出版了 500 多期以后，于本世纪之初，停止了出刊.....。

Ĝuste sur tia historia fono s-ano Lisen komencis sian aktivadon eldoni paperajn librojn por nia ĉina Esperanto-Movado. Siatempe li aĝas jam pli-ol-70jara. Kiel grandaĝa emerito li ja rajtas ripozi. Neniu superulo donis al li la taskon eldoni librojn. Neniom da groŝo li ricevis subvencio de superaj instancoj. Tamen li ankoraŭ kun heroisma braveco ekmarŝas per etaj paŝoj, konstruante per etaj brikoj laŭ sentenco "el milonoj fariĝos milionoj" . Tiel en la unua jardeko de la kuranta jarmilo s-ano mempage eldonis pli ol 32 Esperanto-librojn en papera versio, el kiuj la plej nova eldonaĵo estas <Ni Agadas en Esperantujo> en tri volumoj kun pli ol mil paĝoj. Tiuj libroj estas plenaj de penado kaj amo de Lisen, fariĝante printempa grundo por prosperigi florojn.

就是在这样的历史背景下，李森老开始了他为中国世运出版纸张书的活动。这时他已经年逾古稀，是耄耋之年的退休老者。并没有任何领导给他下达过这样的出版任务。并没有任何上级给过他一文钱的经费资助。然而他壮心不已，积跬步而志千里。在新世纪公元两千年第一个十年里，以艰苦卓绝的努力，先后自费出版了三十多本世界语书籍。作为新纪录的三卷本《我们在行动》，更是多达一千多页。这些书籍无不饱含着李森老的心血和深情，化作春泥更护花。

La eldonaĵoj de Lisen estas kun multflankaj temoj, diversaj aŭtoroj tradukintoj kaj verdaj trajtoj, ekz-e:

李森老出版的这些书籍，题材很宽，作者和译者面很广。选题具备以下的特点：

Valoraj materialoj pri la ĉina Esperanto-Movado,

有保留价值的中国世运历史资料，

utilaj lerniloj por memlerno aŭ progresiĝo de ĉinaj esperantistoj,

有助于中国世界语者学习和进修的读物，

verkoj kiuj povas helpi al fremdaj esp-istoj koni Ĉinion (Esperanto-movado, kulturoj),

有助于外国世界语者了解中国（世界语运动、华夏文化）的作品。

fruktoj de aŭtoroj kaj tradukintoj el la malforta grupo en la ĉina Esperanto-Movado.

还有中国世运中弱势群体的成果。

Nun mi konigas al vi kelkajn el la ĉefaj fruktoj kiel ekzemplojn.

现在将其中的代表作，择要于以简介。

* Esperanto-Movado en la Interna Mongolio, kolektoj pri dek jaroj (1979-1989), dek kvin jaroj (1979-1994), dudek jaroj (1979-1999), tridek jaroj (1979-2009).

Esperanto-Asocio de la Interna Mongolio (EAIM) fondiĝis en 1979-12-09 kiel la unua Esperanto-Asocio el la nacimalplimultaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio. Okaze de la 10-jara, 15-jara, 20-jara kaj 30-jara datreveno de ĝia fondiĝo, eldoniĝis specialaj kolektoj de artikoloj. Kvankam nome de la Esperanto-Asocio de la Interna Mongolio,

tamen la kolektoj ĉiufoje ampleksas verkaĵojn de aŭtoroj tra la tuta lando. Ĉar similaj kolektoj eldoniĝis ne tiel kontinue kaj komplete en aliaj provincoj, tiel la serio da kolektoj nature fariĝis dokumentaro de valoraj materialoj por la studentoj pri la historio de la ĉina Esperanto-Movado.

* 内蒙古世运十年，十五年，二十年，三十年专辑

内蒙古世界语协会成立于 1979 年 12 月 9 日，是中国少数民族自治区中第一家世界语协会。在协会成立十年（1989），十五年（1994），二十年（1999），三十年（2009）之际，都出版了专门的文集。虽然是以内蒙古世界语协会的名义，文章的内容和作者却并不仅仅局限于内蒙，而是包括了全国各个省市。又因为其他省市的世协没有坚持出版这样完整的系列，所以这一套文集实为研究中国世运历史的宝贵文献资料。

* Du eldonoj de la libro <HU Laŭdas Verdakore> (2003-2004)

<HU Laŭdas Verdakore> konsistiĝas el serio da afiŝoj verkitaj de Guozhu dum 20 jaroj, kun temo pri gravaj figuroj kaj eventoj en la ĉina Esperanto-Movado. La aranĝo de s-ano Lisen la libro sinsekve aperis en du versioj nesamaj. La unua estas dulingva (Esperanto-ĉina), 240 p. dediĉata al la 5-a Ĉina Kongreso de Esperanto (2003). La dua tute en Esperanto, 142 p. estis dediĉata al la 89a UK (2004, Pekino), por konigi al la fremdaj esp-istoj pri nia ĉina Esperanto-Movado.

* 说项集两个版本（2003-2004）

《说项集》一书，原本是国柱发表在网上一组帖子，用二十年时间写成，有对于中国世运中重要人物和事件的纪念和介绍。李森老安排先后出了两个不同的版本。一为世汉双语对照，240 面，献给第五届全国世界语大会（2003）。另一个全世界语版本，142 面，则是为了献给（2004 年，北京）第 89 届国际世界语大会，向国外同志介绍中国世运。

* Poemoj de Du Fu (2006)

La unua individua poemaro, kiun ĉinaj esp-istoj kompilis por poetoj de Tang-dinastio, estis <Poemoj de Li Bai>. Malgraŭ ĉia penado, la Esperanta eldono de tiu poemaro finfine ne sukcesis aperi en la patrujo de Li Bai. Tio fariĝis neforviŝebla bedaŭro en la koro de ĉinaj esp-istoj. Pensante pri tiu bedaŭro, kiam pretiĝis la kompilado de la poemaro <Poemoj de Du Fu>, s-ano Lisen laŭte alvokis ke ni nepre ne devas lasi la frukton vagi eksterlanden. Sub la potenco subteno de s-ano Lisen, la Esperanta versio de <Poemoj de Du Fu> fine aperis en Ĉinio, nome de la eldonejo Yuanfang, sub aŭspicio de EAİM. La kajero en Esperanto enhavas 188 p., dum tiu kun 166 poemoj de Du Fu en ĉina originalo okupas 62 p. Tiam forpasis jam 9 jaroj post kiam la poearo <Poemoj de Li Bai> aperis en Japanio, sed la malfavora cirkonstanco por eldonado restis ankoraŭ same senŝanĝa, kun neniom da pliboniĝo. Vere veinda!

* 杜甫诗选（2006）

中国世运为唐代诗人编的第一本个人诗集原是世界语版《李白诗选》。但这本书未能在诗人的祖国出版，始终在中国世界语者心中留下了挥之不去的遗憾。有感于此，当其姐妹篇世界语版《杜甫诗选》编成之后，李森老就大声疾呼，认为这个成果再也不应当外流了。在李森老的支持下，世界语版《杜甫诗选》得以在中国出版，用的是“远方出版社”的名义，由内蒙古世协监制。世界语分册有 188 面，另有一个与之相配的《汉语原诗集锦》分册，有 62 面，收 126 首杜诗。此时距离日本出版世界语版《李白诗选》已经过去九年。但中国世运中出版难的困境

依然如故，并无改善，令人慨叹。

* *Poemoj de Tang-dinastio* (2007)

Kvankam tra multaj malfaciloj tamen fine sukcesis eldoniĝi la Esperanta poemaro <Poemoj de Du Fu> en Ĉinio. Tio donis grandan stimulon al s-ano Lisen kaj li faris aŭdacan iniciaton, ke ni kompilu la Esperantan poemaron <Poemoj de Tang-dinastio> kaj portu ĝin al la 92-a UK (2007, Jokohama) por gloro de Ĉinio. Tiu ĉi libro aspektas ĝemele al la <Poemoj de Du Fu>, sed ĝi estas dulingva, en 322 p. kun libro-numero ISBN 7-80595-888-2 kaj 31 nigra-blankaj ilustraj bildoj. kontribuis resume 329 tradukoj far 15 tradukintoj el 5 landoj (Ĉinio, Japanio, Britio, Hungario kaj Nederlando). Sendube la plej ampleksa poemaro de Tang-poemoj en Esperanto ĝis nun, koniganta poemojn de 88 poetoj de Tang-dinastio, diversajn metrikajn formojn inkluzive de versaĵoj kvinsilaba, sepsilaba, diverssilaba, en malnova maniero, kvinsilaba kvarverso, sepsilaba kvarverso, kvinsilaba okverso, sepsilaba okverso, jŭefu, longa kaj mallonga kantoj.....Tiu ĉi solida libro ĝuis internacie vastan bonvenigon kaj laŭdajn komentojn.

* 唐诗选译 (2007)

世界语版《杜甫诗选》虽然艰难但终于在中国出版，给了李森老很大的鼓舞。他提出了一个大胆的倡议：编译世界语版的《唐诗选译》并且把这本书带到在日本（横滨）举行的第92届国际世界语大会上，为国争光。这本书在外观上与《杜甫诗选》似姐妹篇。全书正文322面，汉世双语对照，书号ISBN 7-80595-888-2，配有31幅黑白插图。

共收有5个国家（中、日、英、匈、荷）15位译者世译的329篇唐诗译文。是迄今为止规模最大的一本世界语版唐诗，共介绍了88位唐代诗人的作品，作品的形式包括了五、七、杂言、古诗，五绝，七绝，五律，七律，乐府，歌行.....等各种体裁。这本唐诗在国外受到欢迎和好评。

* *Saĝaj Vortoj de Laŭzi kaj Konfuceo* (2006)

Ĉina kulturo estas vasta kaj profunda. Kun altiĝo de internacia pozicio de Ĉinio, pli kaj pli multaj neĉinaj legantoj interesiĝas pri ĉinaj klasikaj verkoj. Tiu ĉi libro estas kolektitaj kaj tradukitaj de Wang Chongfang. Eldonita de Yuanfang-eldonejo sub aŭspicio de Ĉina Fervoĵista Esperanto-Asocio (ĈFEA). Dulingva 130 p.

* 老子孔子名言精粹 (2006)

中华文化，博大精深。随着中国国际地位的提高，有愈来愈多的国外读者对中国经典著作表现出浓厚的兴趣。本书选自王崇芳世译的《论语》和《老子》。由远方出版社出版。世汉对照，共130 p.

Aparte kortuŝas nin alia serio da eldonaĵoj, kies aŭtoroj aŭ tradukintoj estas el la malforta grupo en la ĉina Esperanto-Movado, vivante kiel plebanoj en la malsupera tavolo de la ĉina socio. Kvankam ili varme amas Esperanton, sindone laboras per kaj por nia kara lingvo, fervore kreskigas kaj donas fruktojn dank' al sia diligento, tamen, ili ĉiam renkontis nur malvarmajn rigardojn, indiferentajn neglektojn kaj apatiajn reagojn. La fruktoj, kiujn ili kulturis per sia dumviva penado por ĉina Esperanto-Movado, restas nur nulo en la okuloj de la ranguloj, kiuj ĝuas privilegion nur dank' al sia pugo sur potenca sidloko en la nuna ĉina socio. Tamen, honesta s-ano Lisen kun granda amo ofte donas al tiuj homoj aktualajn helpojn, ĝuste kiel donacon

de lignokarboj en neĝa vetero. Tio estas vere kara dono en minuto de bezono. Rigardu kelkajn ekzemplojn:

还有一组出版物，最令人动容，即作者或译者是中国世运中的弱势群体，处在社会底层。这些人无论如何热爱世界语，无论如何努力，无论如何出成果，在屁股决定待遇的当代中国社会，却永远受到冷眼、冷漠、冷遇。这些人以毕生精力为中国世运做出的成果，在特权者的眼中视为无物。而李森老却出以公心，大爱无疆，给这些人的作品以雪中送炭的帮助。让我们来看几个实例：

* La Bofilino (2006)

Romano verkita de Georgi Karaslavov, bulgara fama verkisto. La unua eldono aperis en 1942. Ĉinigiĝis malnova esp-isto fervojisto Xiao Zibin (1919-). Eldonis Ĉina Fervojista Esperanto-Asocio(ĈFEA), dulingva volumo en 470 p. Laŭ opinio de Guozhu, la aldonata parto el <Post Traduko>, <Mia Vivo, Esperanto kaj Mi> verkitaj de s-ano Xiao Zibin, <Post Kompilo> verkita de Lisen, kiuj ne troviĝis en la bulgara eldono, estas pli valora por ni ĉinaj esp-istoj, ĉar per tiuj materialoj ni povas scii pri estimindaj veteranoj kaj memorindaj okazintaĵoj en nia ĉina Esperanto-Movado.

* 儿媳妇 (2006)

保加利亚著名作家 Georgi Karaslavov 的小说，初版于 1942 年。由老世界语者萧资滨同志 (1919-) 译为汉语。

中国铁路职工世界语协会出版，汉世双语对照，全书 470 页。国柱认为，此书增加的保加利亚原版所没有的几个资料，对于我们（译者、编者、读者）更加珍贵。即：萧资滨同志写的《学译后记》，《我的生活历程·我与世界语》，李森所写充满深情的《编后》，借此我们可以得知有这么一位和一些人，这么一件事。

* Esperanto Ne Estas Nur Lingvo

Esperanta lernolibro, verkita de Spomenka Stimec, fama kroata verkistino, aparte taŭga por progresigo de lernantoj post komenca kurso. Ĉinigiĝis Harpina, kiu nur estas ordinara ĉina dommastrino. Lisen eldonis tiun ĉi libron sub nomo de EAIM, dulingva, 46 p.

* 世界语不仅是语言 (2001)

克罗地亚著名世界语作家 Spomenka 所写的世界语课本。特别适合学习完初级班以后进修之用。由 Harpina 译为汉语。译者的身份只不过是一位中国家庭妇女。李森安排以内蒙世协的名义出版，献给第 86 届 UK[注 3]。双语对照，32 开 46 页。

* Tagnotoj pri Mia Vojagho en Japanio

La aŭtoro Minosun estas ordinara ĉina esp-isto. Per Esperanto li vizitis al Japanio kaj la libro estas liaj tagnotoj de 2007-07-27 ĝis 08-03. Dulingva eldono en 52 p. nome de ĈFEA, nepublika distribuado.

* 熊林平访日日记 (2007)

作者 Minosun 为一普通的中国世界语者，借世界语访问日本时按日期从 7 月 27 日到 8 月 3 日所写的日记。

双语对照，32 开 52 页。以中国铁路职工世界语协会的名义内部发行。

* Vento Sed Kun Spuro (2008)

Kolekto de verkaĵoj de Shi Chengtai, kiun la aŭtoro kompilis por sia 70-jariĝa jubileo. Sub tri grupoj kolektiĝis 32 eseoj, kiuj aperis antaŭe en Esperanto dise en diversaj Esperanto-revuoj, kun vasta influo internacie sed ĉinaj legantoj malofte havis ŝancon

legi. Sekve tio estas kremo de dumviva verkado de Shi Chengtai. Estas iom strange (kaj pensige), ke unuflanke Shi Chengtai fekunde verkis kaj tradukis, aliflanke, nenialia libro viciĝas inter la oficiala librolisto eldonita de Pekino. Kun aparta akra videco kaj honesta justamo Lisen eldonis tiun ĉi libron en "Biblioteko de Verda Stepo" nome de Yufang-eldonejo. 190 p.

* 绿原丛书·风过留痕 (2008)

石成泰七十寿辰时自编的汉语文集。分为三辑，32 篇文章。散见于各国世界语刊物，国际影响大而国内读者罕见。是作者毕生作品的精华荟萃。作者一生勤于笔耕，世界语著译非常丰富，却从来没有出现在中国官方世界语出版的书目之中。李森老独具慧眼，安排由远方出版社以“绿原丛书”的名义出版。共 190 面。

* Speciala eldonaĵo pri Dante (2006)

Eseoduopo el <Senfina Honoro, Senfina Adoro> kaj <Nefilegebla Dante>, A4-formato 114 p. La unua artikolo estis prelego de Guozhu kun vicititolo <Dante sub rigardo de ĉina esperantisto>, origine por la IKU de la 91-a UK en Florenco. La dua artikolo iam aperis en n-ro 120 de La Gazeto (2005-10-31) kiel recenzo pri la Esperanta eldono de <Purgatorio> de Dante. En <Post Kompilo> Lisen skribis: Nature, estas granda bedaŭro ke s-ano Guozhu ne povis prelegi pri Dante en la hejmloko de Dante, tamen, estus ankoraŭ pli granda bedaŭro, eĉ homa kulpo, se ni ne aperigus la du eseojn en papera eldono.

Do, Lisen fervore eldonis tion nome de ĈFEA kaj EAIM kiel specialan eldonaĵon de Verda Stepo.

* 伟大但丁 (2006)

此书包含国柱撰写的《伟大但丁说不完》和《读不尽的但丁》两篇文章，A4 开本共 114 面。前者是国柱为第 91 届国际世界语大会大学准备的讲学稿，后者是为世界语版《神曲·炼狱》篇写的书评。李森老在编后中写到：国柱同志未能在但丁故乡说但丁，固然是莫大憾事；但我感到如果这两篇介绍但丁的文章不印成纸版书出版则是更大的憾事。于是以中国铁路职工世协和内蒙世协名义，用“绿原专刊”的形式出版。

La Plej Novaj Fruktoj en 2010

2010 最新的成果

* Kajto de Esperanto (Verkoj de Kurisu Kei)

Kurusu Kei estis fama japana esp-isto. Alte estimata Veterano, preskaŭ centjaraĝa. Lia verkaro en Esperanto jam delonge devis eldoniĝi en Japanio. Tamen la veterano agis ĉiam laŭ altruisma principo "Unue por aliaj, poste por si mem". Li malavare transdonis la sumon origine difinitan por eldono de sia propra verkaĵo transpone kiel monhelpon por eldoni la ĉinigon de <Sepmil Tagoj en Siberio> en Ĉinio 2004. Post 6 jaroj, eldoniĝas la libro <Kajto de Esperanto> en Ĉinio, kompilita de Shi Chengtai, kun Prefaco far Lisen, enkonduko pri la vivo de Kurisu Kei far Shi Chengtai, kaj poemoj omaĝe de Guozhu kaj Mao Zifu. Dika volumo en 368 p., nome de EAIM. Tio ja estas kristalaĵo de amikeco inter ĉinaj kaj japanaj esp-istoj. Tamen la aŭtoro jam forpasis unu jaron pli frue en 2009.

* 世界语的风筝 (栗栖继文集)

日本著名世界语者栗栖继前辈，世纪长者。其个人世界语文集本来可以在本国出

版的，但他以先人后己的精神，慷慨将经费捐助用于支持在中国出版《七千天》一书。六年以后，由石成泰编成这本全世界语版的栗栖继文集，由李森作序，成泰写了介绍作者生平的导言。国柱、毛自赋献诗。共 368 面。以内蒙世协名义出版。堪称是中日两国世界语者友谊的结晶。而作者已经于出版前一年仙逝了。

* Granda librotrio <Ni Agadas en Esperantujo>

Pli ol mil paĝoj propramane kompilitaj de Lisen per komputilo. Ampleksa kaj bunta enhavo. Kolekto de gravaj verkaĵoj de ĉinaj esp-istoj en lastaj 30 jaroj. La plej nova frukto en eldona aktivado de Lisen.

* 我们在行动（三卷本大型文集）

这一套三卷本文集，超过一千多页。由李森老亲自编辑，选贤取材，不拘一格，是中国世界语者近三十年来重要文章的荟萃。也是李森老世界语出版活动的最新硕果。

La influo kaj signifo de persistema eldonado de Esperanto-libroj far Lisen
Unue ni devas scii: En kia situacio Lisen faras la eldonadon. Rimarku, li komencis ekde Nenio.

Li ne sidas sur gvidanta seĝo: sen respondeco.

Li jam emeritiĝis: sen potenco.

Li eldonis altruisme: sen profito.

Li ne havas Esperanto-Eldonejon: sen nomo.

Li havis nenian subvencion: sen mono.

Li havis neniom da salajtigita laboranto-helpanto: sen homo.

Tamen li faris laboron, plenumandan de institucio laŭ devo kaj konscienco.

Lia agado vekis nian karmemoron pri la Esperanto-mimeografaĵoj, kiujn eldonis estimata Tikos en la jaroj de la Granda Kultura Revolucio (1966-1976).

李森老出版活动的影响和意义

李森老在他从事世界语出版活动时候的处境和条件，可以称之为一无所有。

他不在其位，无责；他已经退休，无权；他出书为人，无利；

他没有世界语出版社，无名；他没有上级经费资助，无钱；他没有工作人员编制，无人.....

但是他做出了本应该由一个组织去完成的工作。令人想起了敬爱的方老在文革时期从事的油印书活动。

Ni povas tiel diri, sen nenia troigo, ke sub ĉiu libro eldonita de Lisen troviĝas zigzaga travivaĵo kaj emocia rakonto, komparebla de neniuj disipa luksaĵoj de favora cirkonstanco. En la eldona aktivado de Lisen ni vidas multon: la spirito de ĉinaj esp-istoj penadi memfortiĝi, nefleksebla obstineco en lukto, fidelo al patrujo, arda amo al Esperanto. Hodiaŭ, profitante la okazon jubili la rizaĝan jubileon de Lisen, ni diskonigas liajn farojn, kontribuojn, krom por esprimi nian jesigon, laŭdon, admirojn, pli grave por ke ni ĉiuj lernu de li la bonvirton, la senegoisman sindonemon, pledi honestan konduton por stimuli la antaŭen-marŝon de la ĉina Esperanto-movado kaj fari pli multajn meritojn en la nova epoko.

可以毫不夸张地说，李森老出版的每一本书籍背后，都有一段曲折的经历和动人的故事。远非顺境中的奢侈品能够相比，而是展现着中国世界语者自强不息的精神，百折不挠的斗志，对祖国的拳拳之心，对世界语的执着与热爱。我们今天，

借李森老米寿之际，介绍这样一些事迹，除了肯定、称颂，表达敬意，更重要的是要学习他的优良品德和无私奉献精神。在中国世运中弘扬正气，在新的时期为推进中国世运，作出更多的贡献。

Nun mi volas esprimi mian respekton kaj dankon al estimata veterano Lisen per rondelo kaj 88-silaba versparo:

请允许我以一首双语回旋曲和一幅 88 字对联，向李森老表达我们的敬意和谢意：

Eldonad' de Li Sen abunda
imponas kiel monumento
dank' al verdkora prominento
reliefe sur bravo funda

kun edif-signifo profunda
inspiras per virta prudento.
Eldonad' de Li Sen abunda
imponas kiel monumento.

Fruktoj en serio fekunda
utilas al la Oriento
kaj nutre al la Okcidento
eterne kiel humo grunda.

Eldonad' de Li Sen abunda!
(2010-06-25)

森老出版，巍然丰碑
杰出绿心，无私无畏

身教诲人，启迪智慧
森老出版，巍然丰碑

跬步千里，成果累累
泽被时空，弥足珍贵

森老出版，巍然丰碑

88-silaba versparo

Sen devo, potenco kaj profito, sen nomo mono kaj homo,
la emerito spite al cent mil malfaciloj ankoraŭ heroisme laboras;
Kun verda koro honesto amo, kun virtaj vojo merito,
li tamen persiste eldonis tridek du librojn kiuj internacie valoras.
Brava Lisen!

88 字对联

无责无权无利无名无钱无人，已是耄耋之年的退休老者，面对百千万难，以天下为己任，更显示英雄壮志；
有心有情有义有德有道有功，实乃中国世运之杰出表率，出书三十二卷，令中外同受益，真堪称盖世奇勋。

壮哉李森

Notoj:

[1]Kiam ĈEL donas tian premion en sia nomo, estas du mankoj:

Unue. Sen konigo pri la motivo aŭ merito de la premiito. Malpermesi dankparolon de premiito.

Due. Sur la papero de landranga premio, legiĝas nenia Esperanta litero, tiel ke la premiita Augusto, hispana esp-isto, vole-nevole devas peti en interreto helpon por deĉifri la ĉinan skribon. Bv legu la afiŝon
854 Helpeto 2010-4-11 9:37:21

<http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=10&id=14991>

[2]

Unuflanke, la burokrato de la Fremdlingva Buroo en Pekino ŝvelparolas, ke ili faros la 89an UK (2004 Pekino) "mejoŝtona kongreso", aliflanke, ili rifuzis eldoni la esp-igon de <Laŭzi> far Wang Chongfang.

Komentante pri tia ago, Guozhu parolis en la 5-a Ĉina Kongreso de Esperanto jene:

Se la granda ŝtato, kiu volas fari Pekinan UK mejoŝtona, en la okazo eldoni libreton kun 5 mil ideogramoj, devas peti (aŭ akcepti) monhelpon de Koreio, ĉu ni ĉinoj kaj ĉinaj esp-istoj ne sentas ĝisostan honton!!!
(Kun larmoj en okuloj)

<<http://www.elperno.cn/albumo/5-a%20konreso-16.htm>>

[3]

La 86-a UK okazis en Kroatio (Zagrebo) 2001 kaj Spomenka funkciis kiel la ĉefsekretario de LKK.

注解:

[1]

全国世协在颁发这类奖状的时候，有两点是做得不到位的。

其一是没有介绍得奖人的事迹，也不让答谢。

其二是国家级的奖状上没有一个世界语字母，以致西班牙世界语者奥古斯特得到 CEL 颁发的一张奖状之后，完全看不懂，不得不在互联网上发帖子请人帮他解读。

854 Helpeto 奥古斯特求助 2010-4-11 9:37:21

<http://www.elperno.cn/bbs/dispbbs.asp?boardid=10&id=14991>

[2]

外文局领导一方面说要把 2004 年的北京 UK 开成“里程碑式的会议”，一方面又连五千字的《老子》世译也不肯出版。国柱在第五次全国世界语大会上发言时说：

如果一个想把北京 UK 开成里程碑式 UK 的堂堂中华大国，连出版一本五千汉字的小书也要请求（或曰接受）韩国的赞助，我们，中国人和中国世界语者，是不是应该羞愧到无地自容!!!（热泪盈眶！）

——摘自国柱《回眸“五大”·论里程碑》

<http://www.elperno.cn/albumo/5-a%20konreso-16.htm>

[3]

第 86 届 UK 于 2001 年在克罗地亚（萨格勒布）召开。Spomenka 为大会 LKK 秘书长。